# NOVAĴLETERO

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista - Reĝa Societo
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep, Kon. Maatschappij

Nr. 12 - Okt. 1984

Verantw. Uitgever:

Roland Rotsaert
Visspaanstraat 97
B-8000 Brugge

Tel. 050/33.00.04

Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85 van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge. Steunende leden: 500 fr.

## Belangrijke mededeling

Zoals reeds vermeld in vorige nummers, waren er contacten met de groep "Paco kaj Justeco" om tot een of andere vorm van samenwerking te komen, op gelijkwaardige basis.

In tegenstelling met wat voorlopig afgesproken werd tijdens de gemeenschappelijke bestuursvergadering van vorige maand, blijkt dat Paco kaj Justeco toch niet instemt met een dergelijke samenwerking. De tekst van hun brief vindt u op een volgende bladzijde.

Een beperkte bestuursvergadering heeft geoordeeld dat ingaan op de in deze brief gedane voorstellen in feite zou neerkomen op het opheffen van de Brugse Esperanto-Groep, wat onaanvaardbaar is.

Gezien de beperkte mankracht waarover de groep momenteel beschikt, zal de werking tijdens de komende maanden hoofdzakelijk beperkt blijven tot de voorbereiding van het Markola Kongreso te Brugge in april 1985.

De geplande buitengewone algemene vergadering van 11 oktober gaat dus niet door. Overeenkomstig punt 1 van de brief van Paco kaj Justeco zijn wij nochtans uitgenodigd op hun vergaderingen, de 2e en 4e donderdag van de maand, in het Hof van Watervliet.

Het Bestuur.

Aangekondigde congressen

+ Esperanto-Semajnfino "Junuloj kaj la Krizo en Eŭropo" je 2-4 nov. 1984 en De Pinte. Aliĝilo havebla ĉe Ilse Jacques, Molenstraat 29, 2018 Antwerpen.

+ 9-11 nov. 1984: Internacio semajnfino je The Friars, Aylesford, Maidstone. Informoj: Mollie Buckle, 53 South Str., Barming, Maidstone ME16 9EX, U.K.

+ 3-8 aŭg. 1984: 70a Universala Kongreso de Esperanto, Augsburg.

Aangekondigde cursussen

Paco kaj Justeco organiseert een cursus voor beginners vanaf vrijdag 19 oktober (De Bogaerde, Arsenaalstraat, Brugge - 19.15 u.). Cursusgeld nog niet vastgesteld. Inlichtingen: F. Roose, tel. 33.19.81.

Dr. W. de Smet organiseert een "stoomcursus" te Antwerpen op 1, 2 en 3 november a.s. Prijs: 1.000 fr. inclusief handboek en woordenboek. Enkel voor personen met een goede kennis van grammatica en enkele vreemde talen. Inlichtingen: Esperanto-Centrum, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen.

9aj Esperanto-tagoj en Bydgoscze

Antaŭ ol mi foriros al la internacia junulara kongreso en Swanwick, jen mi ŝatas iom skribi pri neantaŭvidita kongreso, kiun mi ĉeestis dank'al Radio Polonia. Temas pri la kongreso de la 9aj Esperantaj Tagoj en Bydgoszcz je la 3a ĝis la 10a de junio.

Mi havis la bonan ideon vojaĝi kun s-ro De Bruyne en lia motorhejmo. Sekure kaj rapide ni atingis Pollandon (eĉ ĉe la limoj ne estis gravaj problemoj) kaj samvespere estis en Bydgoszcz. Vere gastemajn personojn ni renkontis kaj Leo, kiel regula vizitanto, jam estas famkonata en Pollando. Ni ankaŭ vizitis la ĉirkaŭajn urbetojn kiel Torun kaj Poznan, kiuj detruiĝis dum la dua mondmilito.

Ankaŭ dum la tuttaga ekskurso mi estis ĉemare en Gdynia kaj en Gdansko (kie bedaŭrinde pluvegis), tiel ni devis trakuri la urbocentron.
Dum la kongreso mem samtempe okazis pacseminario kie la laŭreatoj (12 personoj el 10 landoj) povis kundiskuti pri la temo; ege interesajn interŝanĝojn ni havis. Dum la vesperoj okazis kulturaj aranĝoj kiel ekzemple ĥorkantado, teatraĵoj pri fabeloj kaj esperantlingva filmo pri Luksemburgo. Sabate, la 9an de junio okazis geedziĝmeso kaj koncerto en la popola parko de Bydgoszcz.

Do, bone organizita kongreso. Se vi havas la eblecon sekvontjare, aliĝu ĝin ! Aŭ, se vi emas viziti Pollandon, kontaktu s-ron De Bruyne, ĉar vere ĝi estas vizitinda lando.

Tamen, nia vojaĝo ne finiĝis tiam. Pro la fakto ke ni devis atendi la elirpermeson de pola kunvojaĝonto, ni vizitis dum du tagoj tutan Berlinon. Kia diferenco inter la du partoj: la vigla fanfaronanta okcidento kontraŭ la imitanta oriento, bone konservita.

Revenante Belgion ni tamen havis problemojn ĉe la orientgermana limo pro rekta pensado de tieaj doganistoj, sed kontraŭ la konvinkigaj vortoj de Leo neniu povas rezisti !

Lace kaj feliĉe ni revenis en Bruselo, pensante pri spertoriĉa restad-periode ĉe amikemaj poloj. Ĝis revido !

Jean Pierre

(IJK-raporto sekvos)

Aliĝoj al Markola Kongreso 1985

42. Suzanne Desmedt, Knokke-Heist.

Letero de la Esperanto-Grupo "Paco kaj Justeco"

**Brugge 28-9-'84**

**Al la estraro kaj al la gemembroj de la "Bruĝa Grupo Esperantista-Reĝa Societo"**

**Estimataj Gesamideanoj**

**En la rilato kun la kunigo de la du Bruĝaj esperanto-grupoj,la estraro kaj la gemembroj de "Paco kaj Justeco" kunvenis la 27-9-'84,kaj prenis la jenan decidon.**

**1) Ni invitas ĉiujn viajn gemembrojn ĉeesti niajn kunvenojn, en ia ajn devo,ĝis la 31a de decembro '84. Tiam ili decidu ĉu jes ĉu ne membriĝi de "Paco kaj Justeco".**

**2) Nia estraro alprenos du viajn estraranojn(indikotajn de vi) en nia estraro kiel observantojn;ankaŭ ĝis la 31a de decembro 1984.**

**3) Se eble,kaj se oportune,ni organizos jam en januaro 1985 ĝeneralan kunvenon en kiu la gemembroj elektos novan(eventuale plilarĝigitan) estraron.**

**Aldona komentario:**

**Ni tre esperas ke vi venos.Nia grupo estis de la komenco,kaj restis grupo de "viv-amikoj".La vizitado de niaj kunvenoj permesos al vi krei novajn geamikajn ligojn,kaj kapti la etoson kiu regas en nia grupo.Tiamaniere (re)unuigitaj ni povos pli,kaj kun pli granda energio,labori por Esperanto.La nuna Esperanto-movado forte kaj urĝe bezonas nin.**

**Ni salutas vin kore kaj samideane**
**Nome de la grupo "Paco kaj Justeco"**
**la prezidanto F.Roose**

Roose